

ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 7 — Januaro-Februaro 1994

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio. ☎ 09 574 1307. Fakso: 09 574 1530.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

En Ĉi Tiu Numero

Nova hipotezo pri la deveno de Aŭstralio (Anonima)	3
Longa promenado al eterneco (Kurt Vonnegut Jr)	6
Nekrologo: Winsome Greenhalgh (Ray Ross).....	10
Grava Averti!	10
Nia redakcia stabo	11
Recenzo: <i>La Skolta Mondo</i>	12
"Flegu la flamon" (<i>Auld Lang Syne</i>)	13
Lingva Angulo (Alan Towsey)	14
<i>retro</i> (Georgo Kamaŝo)	18
Recenzaj impresoj pri du programoj disenditaj el Radio 3ZZZ Melburno (Vera Payne)	19
Impresoj de biciklado en Aŭstralio (Anita Bergh)	21
Balbutantoj (Ko Nurmi)	23
Diversaĵoj	24
Nia fotoalbumo.....	25
El la regionoj	26
Pri Iltis-Eldonejo (Ulrich Becker)	26

English Supplement

SKANDALO: ODLO BOKSERP NUDA! (FOTO P.11)

URĜE BEZONATAJ: FOTOJ, BILDOJ, DESEGNOJ POR ESKI SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Vi povas sendi viajn verkojn al ni tajpitajn aŭ sur 3½-colaj diskoj Macintosh aŭ MS-DOS. Se vi sendas manuskripton, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu per freŝa rubando sur nur unu flankon de ĉiu folio. Netajpitaĵojn manuskriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti

ĉiun tekston antaŭ aperigo. La redaktoro rajtas konformigi la artikolojn al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone artikolo povas esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvanta numero, krom se temas pri io kronologia urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo aŭ nepublikigo de artikolo indikas nek aprobon nek malaprobĉon de ĝia enhavo fare de la redaktoro aŭ de la eldonantaj Asocioj.

Absoluta limdato por ricevo de kontribuoj por nia venonta numero: 24 februaro.

Nia Kovrilbildo: ĉi tiu estas la dua el la tri premiitaj proponoj por kovrilo por *Esperanto sub la Suda Kruco*. Ĝi estis desegnita de Cliff Hall.

NOVA HIPOTEZO PRI DEVENO DE AŬSTRALIO (DE AŬTORO ANONIMA) TR. AL. SEMENOV

La sekvanta artikolo origine aperis en la gazeto Lingvo Internacia, N.º 5, majo 1896, eldonita de la Klubo Esperantista en Uppsala. Fotokopion bonvole sendis al ni Anita Bergh (Svedio). Ĝia teksto estas represita ekzakte kiel ĝi originale aperis.

Aŭstralia kontinento tiel distingigas inter ĉiuj ceteraj kontinentoj de l' tera globo kaj prezentas tiajn rimarkindajn anomaliajn, ke ĝia deveno ŝajnis ĉiam enigma. Antaŭ ĉio turnas atenton en Aŭstralio plena foresto de efikantaj aŭ estingiĝintaj vulkanoj kaj eĉ de ĉiuj postesignoj aŭ aludoj pri vulkana efikado, malgraŭ tio, ke Aŭstralio troviĝas en la centro mem de seninterrompa vulkana duonringo, kiu ĉirkaŭas ĝin en tre proksima spaco kaj kiu finiĝas en Nova Zelandio. [sic!] Tiu ĉi fakto estas tiom pli neklarigebla, ke subtero de Aŭstralio konsistas nome el tiaj ŝtonaj specoj, en kiuj ĉiam oni observas postsignojn de vulkanaj influoj. Sur la tuta tera globo nenie estas tia granda placo, konsistanta el primitivaj specoj aŭ formacioj, en kiuj oni observas ion similan al tio, kion oni observas en Aŭstralio, t.e. plena foresto de ĉiaj postsignoj de vulkanaj aperoj, kiel en nuna, tiel ankaŭ en estinta tempo. Krom tiuj ĉi anomaliaj en Aŭstralio ekzistas ankoraŭ multaj strangaj apartecoj, distingantaj ĝin de ceteraj kontinentoj de l' tera globo. Tiajn samajn apartecojn prezentas ankaŭ aŭstraliaj montoj. Kontraŭe al aliaj kontinentoj en Aŭstralio ekzistas nur

escepte apartaj altaĵoj, tute izolitaj kaj ne kunligitaj inter si. Solan escepton prezentas la monta ĉeno, kiu sin tiras laŭlonge de orienta kaj parte de sud-orienta bordo. Sed formiĝo de tiu ĉi ĉeno povas esti klarigita per tio, ke interspacoj inter apartaj altaĵoj estis ekplenigitaj per produktoj de rapida disfalo de ŝtonaj masoj, dank' al la proksimeco de l' oceano, akcelanta pli rapidan detruadon de l' ŝtonaj specoj. Tia anomalion prezentas en Aŭstralio ankaŭ la foresto de grandaj riveraj sistemoj; tie estas nur malgrandaj riveretoj, ofte sekiĝantaj kaj fluantaj laŭ iaj fosajoj. Dum sur ĉiuj aliaj kontinentoj ekzistas vastaj valoj kaj ebenaĵoj kaj grandaj riveraj sistemoj, liverantaj al la tera supraĵo pli aŭ malpli senĉesan irigacion. En Aŭstralio videble tute ne ekzistas subteraj fontoj en internaj partoj de kontinento, kaj irigacio de tero estas tre neregula. Nur en certa tempo de jaro, post la periodo de pluvoj disvolviĝas kreskaĵaro, dank' al granda malsekaĵo; en alia tempo la internaj partoj de kontinento prezentas sekan, ŝtonan kaj senfruktan dezerton. Rimarkinda ankaŭ estas tio, ke la supraĵo de aŭstralia kontinento estas elsulkigita en ĉiuj direktoj per multe-

nombraj fendoj, kies deveno estas nekomprenebla, ĉar oni ne povas alskribi ilin al la efiko de vulkanaj fortoj. Ĉiuj tiuj ĉi anomalioj, renkontiĝantaj sur la aŭstralia kontinento, tre enigmaj kaj nekompreneblaj, fariĝas facile klarigeblaj, se nur akcepti hipotezon pri meteora deveno de Aŭstralio. Tiu ĉi hipotezo en unua fojo estis eldirita de franca instruitulo Djufren kaj alplenigita de Frohmann en lia nova laboro "les merveilles de la flore primitive", antaŭ nelonge elirinta en la mondon. Kvankam tiu ĉi hipotezo pri "netera" deveno ŝajnas mirinda kaj kuraĝa, tamen oni devas konfesi, ke ĝi havas nenion nekredoblan aŭ neeban, aparte ĉe tiuj faktaj pruvoj, kiujn alkondukas la instruituloj por pravigi sian teorion. Antaŭ ĉio ili montras tion, ke laŭ la teorio de formiĝo de l' planeda sistemo la tera akso devus esti vertikala al la ebenaĵo de ekliptiko, dume ĝi staras ne rekte sed klinite al la ebenaĵo de l' turniĝo de l' tero ĉirkaŭ la suno, kontraŭ al ĉiuj teoriaj meditadoj kaj leĝoj de meĥaniko. La historio de tiu kreskaĵaro sur la tera globo, dank' al kiu formiĝis la kuŝantaj en la interno de l' tero ŝtonkarbaj tavoloj, donas kelkajn montrojn, konstatantajn hipotezon pri antaŭa vertikaleco de l' tera akso. Tiuj ĉi ŝtonkarbaj tavoloj estas dismetitaj laŭ la tero tre neegalmezure: en ekvatora kaj en tropikaj regionoj tiuj ĉi tavoloj renkontiĝas malofte kaj estas tre maldikaj, dum en mezaj kaj polaraj landoj ili troviĝas en superfluo kaj distingiĝas per dikeco kaj vastigiteco. Krom tio ne estas dubebla la fakto, ke la ŝtonkarbaj tavoloj en nordaj kaj polaraj termezuroj de-

venis multe pli frue, ol en plej proksimaj al la ekvatoro termezuroj, kaj tio ĉi klare montras, ke la kreskaĵa vivo sur la tero disvolviĝas komence ĉe la polusoj, kaj post tio jam de tie disvastiĝas al la ekvatoro. Riĉeco de ŝtonkarbaj tavoloj en nordo atestas pri neĉirkaŭpreneblaj kvantoj da surtavoliĝintaj tie kreskaĵaj restoj kaj pruvas, ke polara floro en la ŝtonkarba periodo per sia riĉeco malproksime superis eĉ la nuntempan tropikan floron. Kompreneble, por tio, ke povu disvolviĝi tia kreskaĵaro, estis necesaj lumo kaj varmo, kaj tial oni devas vole-nevole supozi, ke en la polaraj landoj en tiu ĉi periodo ekzistis favoraj kondiĉoj por disvolviĝo kaj kresko de kreskaĵoj; tiuj ĉi samaj kondiĉoj estas neebaj ĉe ekzistanta nun kliniĝo de l' tera akso kaj oni devas supozi, ke tiam tiu ĉi kliniĝo ne ekzistis, la akso de l' tera turniĝo staris rekte, kaj sur la tuta tero de l' polusoj ĝis la ekvatoro estis nur unu seninterrompa kaj neŝanĝebla tempo de jaro, kaj la tagoj estis egalaj al la noktoj. Kial devenis tiu ĉi kliniĝo, elvokinta subitajn ŝanĝojn de klimato sur la tero? Suprenomitataj instruituloj proponas la sekvantan hipotezon por klarigi tiun ĉi aperon: la kliniĝo de l' tera akso devenis sub influo de ekstera forto, kiu subite elbatis la teran globon el ĝia komenca situacio. Tia "ekstera" forto povis esti grandega meteora maso, falinta sur la teron el la profundaĵoj de l' ĉiela spaco, kiu per sia falo neniigis la antaŭan egalpezon de nia planedo. Falado de kosmaj korpoj prezentas sufiĉe oftan kaj ordinaran aperon sur la tera globo. Laŭ la alproksimitaj kalkuloj sur la teron falas en dudek

Ĥvar horoj kelkaj centoj da miloj da meteoroj. Plej ofte tiuj ĉi meteoroj estis malgrandaj laŭ sia amplekso, tamen iafoje renkontiĝas inter ili grandegaj. Nenio estas nekredibla en tiu supozo, ke en la sfero de l' tera altiro povis veni tre granda kosma korpo, kies falo estis la kaŭzo de ŝanĝoj sur la tera globo. Tiu ĉi grandega laŭ sia grandeco kaj pezo meteoro estas Aŭstralio.

Djufren supozas, ke sur tiu loko, kie troviĝas Aŭstralio, devis ekzisti antaŭe ia granda vulkana centro, kiu estis poste kovrita kaj neniigita per la falinta tien ĉi asteroido. Frohmann montras krom tio ankaŭ tion, ke la tera akso estis deklinita je $23^{\circ} 28'$, kaj la centro de l' Aŭstralio kontinento ĝuste ankaŭ troviĝas sub 23:a grado de l' suda termezuro. Konsisto el ŝtonaj specoj, kiuj formas fondon de Aŭstralio nenion diras kontraŭ la hipotezo pri ĝia meteora deveno. Kompreneble, nenia imago povas prezenti al si la pentraĵon de tiu terura tremado, kiun devis elprovi la tero en la momento de falo de tia asteroido. La katastrofo devis esti laŭvere terura, en plena senco de tiu ĉi vorto, ĉar terura ĉion ekstermanta uragano devis traflugi laŭ la tuta supraĵo de l' tero, kaj oceana ondo de gigantaj mezuroj devis leviĝi kaj superakvigi la teron de l' suda duonglobo. Ĉe tio ĉi, kompreneble, devis formiĝi grandega maso da akvaj vaporoj, ĉar la falado fariĝis en oceanon, kaj tiuj ĉi vaporoj falis post tio sur teron en formo de pluvaj fluoj. Kiel postsigno de tiu ĉi katastrofo aperis kliniĝo de l' tera akso kaj la elvokitaj per tio ĉi ŝanĝoj de klimato sur la tera globo; ĉe l' polusoj aperis eternaj glacioj. Per tia maniero la nova hi-

potezo pri la deveno de Aŭstralio ne sole ne kontraŭparolas al faktoj, konfirmitaj per la scienco, sed eĉ klarigas multajn aperojn de l' pasinta kaj nuna vivo de l' tero, kiuj sen tiu ĉi hipotezo, ŝajnas al ni enigmaj kaj ne kompreneblaj. □

10a AŬSTRALIA ESPERANTO SOMER-LERNEJO EN ADELAJDO JANUARO 1994

D-ro Broadribb informas ke por nivelo 3 la libro uzota estas *La Respubliko de Platono*, eldonita de la Libroservo de AEA kaj aĉetebla ĉe la Somerlernejo (\$20).

Por nivelo 4 la libro uzota estas *The Dream Story*, eldonita de la University of Western Australia Press kaj aĉetebla disde D-ro Broadribb ĉe la Somerlernejo (\$15). □

SOMERLERNEJO KAJ KONGRESO 1995

Post konsiderado de proponoj de la Esperanto-Federacio de Kvinslando kaj la Toowoomba Esperanto-Societo, la LKK proponas ke la Somerlernejo okazu en Adelajdo kaj tiel daŭrigu la firme establitajn kursarangojn en tiu urbo, kaj ke la AEA-Kongreso en 1995 okazu en Suda Kvinslando, ĉe zorge elektita ejo kaj dum klimato akceptinda dato, probable en majo.—Ray Ross □

LONGA PROMENADO AL ETERNECO DE KURT VONNEGUT JR TR. DAVID POULSON

La sekvanta rakonto estas tradukita kaj presita laŭ permeso de la kopirajtposedanto.

Li plenkreskis en apudaj domoj, ĉe la rando de urbego, proksime al kampoj kaj arbaroj kaj fruktarboj, ne malproksime de bela sonorilturo kiu apartenis al lernejo por blinduloj.

Nun ili havas dudek jarojn kaj ili ne interrenkontis sin dum preskaŭ jaro. Inter ili estis ĉiam ludema, komforta varmeĉo sed neniam ili parolis pri amo.

Li nomiĝis Newt. Ŝi nomiĝis Catherine. En la frua posttagmezo, Newt frapis sur la pordon de Catherine.

Catherine venis al la pordo. Ŝi portis dikan, buntan magazinon kiun ŝi ĵus legadis. La magazino temis tute pri noveloj. "Newt!" ŝi diris. Ŝin surprizis vidi lin.

"Ĉu vi volas promenadi kun mi?" li diris. Li estis timida, eĉ kun Catherine. Por kaŝi sian timidon, li parolis distre, kvazaŭ la afero pri kiu li vere okupiĝas estas malproksima—kvazaŭ li estus sekreta agente nur mallonge paŭzanta dum tasko deviganta lin veturi inter belaj, foraj, kaj sinistraj lokoj. Tia parolmaniero ĉiam estis la kutima stilo de Newt, eĉ kiam li parolis pri aferoj kiuj urĝege koncernas lin.

"Ĉu promenadi?" diris Catherine.

"Unu piedon antaŭ alia," diris Newt, "inter folioj, trans pontoj—"

"Mi tute ne sciis ke vi estas en la urbo," ŝi diris.

"Mi ĵus alvenis, je ĉi tiu minuto," li diris.

"Ankoraŭ en la armeo, mi rimarkas," ŝi diris.

"Restas sep monatoj plu," li diris. Li estis simpla soldato en la artillerio. Lia uniformo estas ĉifa. Liaj ŝuoj estis polv-makulitaj. Li bezonis razi sin. Li etendis manon por preni la magazinon. "Permesu al mi rigardi la belan libron," li diris.

Ŝi donis ĝin al li. "Mi intencas edziniĝi, Newt," ŝi diris.

"Mi scias," li diris. "Ni promenadu."

"Mi estas terure okupata, Newt," ŝi diris. "Post nur semajno okazos la geedziĝo."

Li turnis la paĝojn de la gazeto. "Rozkolora novelo, same kiel ŝi— kiel ŝi—kiel ŝi."

Rozkolorajn novelojn li montris al ŝi.

Catherine fariĝis rozkolora, pensante pri rozkoloraj noveloj.

"Tio estos mia donaco al Henry Stewart Chasens," diris Newt. "Per promenado kun vi, mi donos al li rozkoloran novelon."

"Ĉu vi scias lian nomon?" diris Catherine.

"Patrino skribis," li diris. "Ĉu de Pittsburgh?"

"Jes," ŝi diris. "Li plaĉos al vi."

"Eble," li diris.

"Ĉu—ĉu vi povos ĉeesti la edziĝan feston, Newt?" ŝi diris.

"Tion, mi ne kredas," li diris.

"Ĉu vi ne havas sufiĉe longan libertempon?" ŝi diris.

"Ĉu libertempon?" diris Newt. Li studis du-paĝan reklamon pri argentajoj. "Mi ne havas libertempon," li diris.

"Ĉu?" ŝi diris.

"Mi estas, onidire, A.W.O.L."¹ diris Newt.

"Ho, Newt! Vi ne estas!" ŝi diris.

"Certe mi estas," li diris, ankoraŭ trarigardante la gazeton.

"Kial, Newt?" ŝi diris.

"Necesis, ke mi eltrovu la desegnon de via argentajo," li diris. Li legis nomojn el la gazeto. "Ĉu Albermaarle, aŭ Heather?" li diris. "Ĉu Legend, Rambler Rose?" Li suprenrigardis, ekridetis. "Mi intencas doni al vi kaj al via edzo kuleron," li diris.

"Newt, Newt—diru al mi la veron," ŝi diris.

"Mi deziras promeni," li diris.

Fratine, ŝi tordis la manojn pro angoro. "Ho, Newt—vi trompas min pri la A.W.O.L.," ŝi diris.

Newt mallaŭte imitis la bruon de polica hupo, levis la okulbrovojn.

"De—de kie?" ŝi diris.

"De Fort Bragg," li diris.

"North Carolina?" ŝi diris.

"Prave," li diris. "Proksime al Fayetteville—kie edukigis Scarlet O'Hara."

"Kiamaniere vi alvenis ĉi tien, Newt?" ŝi diris.

Li suprenlevis la dikfingron, kvaŝaŭ petante veturon. "Du tagojn," li diris.

"Ĉu scias via patrino?" ŝi diris.

"Mi ne venis ĉi tien por vidi mian

patrinon," li diris al ŝi.

"Por vidi kiun vi venis?" ŝi diris.

"Vin," li diris.

"Kial min?" ŝi diris.

"Ĉar mi amas vin," li diris. "Nun, ĉu ni promenadu?" li diris. "Unu piedon antaŭ alia—inter folioj, trans pontoj."

Nun ili promenadis en arbaro, sur planko de brunaj folioj.

Catherine kolerigis: ŝin ĉagrenis kaj ŝi estis preta plori. "Newt," ŝi diris, "ĉi tiu afero estas tute freneza."

"Kial, do?" diris Newt.

"Kia frenezaĵo, diri al mi nun ke vi amas min," ŝi diris. "Neniam antaŭe vi parolis al mi tiamaniere". Ŝi ĉesis promeni.

"Ni plu promenu," li diris.

"Ne," ŝi diris. "Ĝis ĉi tie—kaj ne plue. Pli bone estus se mi ne elirus kun vi," ŝi diris.

"Vi ja eliris."

"Nur por devigi vin eliri la domon," ŝi diris. "Se iu enirus kaj aŭdus vin paroli al mi tiamaniere, unu semajnon antaŭ la geedziĝo—"

"Kion oni opinius?" li diris.

"Oni opinius, ke vi estas freneza!" ŝi diris.

"Kial?" li diris.

Catherine profunde enspiris kaj faris paroladon. "Permesu min diri, ke mi estas profunde honorata per ĉi tiu frenezaĵo, kiun vi faris," ŝi diris. "Mi ne povas efektive kredi, ke vi estas A.W.O.L., sed, eble, vi estas. Mi ne povas kredi, ke vere vi amas min, sed eble—"

"Mi ja amas vin," diris Newt.

"Nu, mi estas profunde honorata," diris Catherine, "kaj mi tre amas vin—kiel amikon, Newt,

¹A.W.O.L. = "Away without official leave" = senpermeso foririnta.

ege—sed, estas simple tro malfrue.”
Ŝi faris unu paŝon for de li.
“Neniam vi eĉ kisis min,” ŝi diris,
kaj per la manoj protektis sin. “Mi
ne intencas diri, ke vi devas nun
fari tion. Mi nur intencas diri, ke
tio ĉi estas tiel malatendita. Mi tute
ne scias reagi.”

“Nur promenu plue,” li diris. “Bo-
ne ĝuu la okazon.”

Ili komencis promeni denove.

“Kiel vi atendis min reagi?” ŝi dir-
is.

“Kiel mi povis scii, kion atendi?”
li diris. “Neniam antaŭe mi faris
ion ĉi tian.”

“Ĉu vi kredis, ke mi min ĵetos en
viajn brakojn?” ŝi diris.

“Eble,” li diris.

“Mi bedaŭras trompi viajn esper-
ojn,” ŝi diris,

“Vi ne trompis miajn esperojn,” li
diris. “Mi ne kalkulis je tio. Estas
tre agrable nur promeni.”

Catherine denove haltis. “Ĉu vi
scias, kio nun okazos?” ŝi diris.

“Ne,” li diris.

“Ni manpremos,” ŝi diris. “Ni
manpremos kaj disiros, kiel amikoj.
Tio nun okazos.”

Newt kapjesis. “Do, bone,” li diris.
“Memoru min de tempo al tempo.
Memoru kiom mi amis vin.”

Vole nevole, Catherine ekploris.
Ŝi turnis la dorson al Newt kaj ri-
gardis la arbaron.

“Kion signifas tio?” diris Newt.

“Koleregon!” diris Catherine. Ŝi
pugnigis la manojn. “Vi ja ne rajt-
as—”

“Mi devis eltrovi,” li diris.

“Se mi amus vin,” ŝi diris, “mi
jam informus vin antaŭ nun.”

“Ĉu vere?” li diris.

“Jes,” ŝi diris. Ŝi suprenrigardis
lin. “Vi iam scius.”

“Kiel?” li diris.

“Vi jam vidus ĝin,” ŝi diris. “Vir-
inoj ne povas lerte kaŝi ĝin.”

Newt rigardis atenteme la vizaĝ-
on de Catherine. Konsternite, ŝi
konstatis, ke estas vera tio kion ŝi
ĵus diris. Virino ja ne povas kaŝi
amon.

Newt ja nun vidas amon.

Kaj li faris tion, kion li devis fari.
Li kisis ŝin.

“Estas infere malfacile trakti kun
vi!” ŝi diris, post kiam Newt liber-
igis ŝin.

“Ĉu?” diris Newt.

“Vi ne rajtis fari tion,” ŝi diris.

“Ĉu ne plaĉis al vi?” li diris.

“Kion vi atendis — sovaĝan, sen-
bridan pasion?”

“Mi refoje informas vin,” li diris.

“Mi neniam scias kio okazos poste.”

“Ni diros adiaŭ,” ŝi diris.

Li sulkigis la frunton, iomete.
“Do, bone,” li diris.

Ŝi faris duan paroladon. “Mi ne
bedaŭras pro tio ke ni kisis,” ŝi
diris. “Tio estis dolĉa. Ni devis kisi,
ni ja estis tiel intimaj. Mi ĉiam me-
moros vin, Newt, kaj bonan for-
tunon.”

“Kaj al vi,” li diris.

“Dankon, Newt,” ŝi diris.

“Tridek tagojn,” li diris.

“Kion?” ŝi diris.

“Tridek tagojn en la palisaro,” li
diris—“Tiom kostos al mi unu kiso.”

“Par-Pardonu min,” ŝi diris, “sed
mi ne petis vin iri A.W.O.L.”

“Mi scias,” li diris.

“Vi ja ne meritas rekompencan
por heroo ĉar vi faris ion tiel stult-
an, kiel tion,” ŝi diris.

“Esti heroo sendube estus agrable,”
diris Newt. “Ĉu Henry Stewart
Chasens estas heroo?”

"Li povus esti, se li havus la okazon," diris Catherine. Ŝi rimarkis, maltrankvile, ke ili denove komencis promeni. La adiaŭo estis forgesita.

"Ĉu vere vi amas lin?" li diris.

"Certe mi amas lin!" ŝi diris arde. "Mi ne edzigus lin, se mi ne amus lin."

"Kio pri li estas bona?" diris Newt.

"Nu!" ŝi kriis, haltante duafoje, "Ĉu vi havas eĉ ideon kiel ofendeme agas vi? Multe, multe, multe da bonaj ecoj havas Henry! Jes," ŝi diris, "kaj verŝajne li havas ankaŭ multajn, multajn, multajn malbonajn ecojn. Sed tio ne estas via afero. Mi amas Henry kaj ne necesas diskuti kun vi pri liaj meritoj!"

"Pardonon!" diris Newt.

"Nu!" diris Catherine.

Newt kisis ŝin denove. Li denove kisis ŝin ĉar ŝi volis tion.

Nun ili troviĝis en granda frukt-arbaro.

"Kiel ni iris tiel malproksimen de la hejmo, Newt?" diris Catherine.

"Unu piedon antaŭ alia—inter folioj, trans pontoj," diris Newt.

"Ili multigŝas—la paŝoj," ŝi diris.

Sonis la sonoriloj en la turo de la proksima lernejo por blinduloj.

"Lernejo por blinduloj," diris Newt.

"Lernejo por blinduloj," diris Catherine. Ŝi skuis la kapon pro duondorma miro. "Mi devas reiri nun," ŝi diris.

"Diru ĝis la revido," diris Newt.

"Kiam ajn mi faras tion," diris Catherine, "ŝajnas, ke oni kisas min."

Newt sidiĝis sur la mallongige

tondita herbaro, sub pomarbo. "Sidiĝu," li diris.

"Ne," ŝi diris.

"Mi ne tuŝos vin," li diris.

"Mi ne kredas vin," ŝi diris.

Ŝi sidiĝis sub alia arbo, sep metrojn for de li. Ŝi fermis la okulojn.

"Revu pri Henry Stewart Chasens," li diris.

"Kion?" ŝi diris.

"Revu pri via mirinda estonta edzo," li diris.

"Konsentite, mi ja faros tion," ŝi diris. Ŝi fermis la okulojn pli streĉe, ade videtis sian estontan edzon.

Newt oscedis.

La abeloj zumis en la arboj kaj Catherine preskaŭ ekdormis. Kiam ŝi malfermis la okulojn ŝi vidis ke Newt efektive ja dormas.

Li komencis ronki, mallaŭte.

Catherine permesis al Newt dormi dum unu horo, kaj dum li dormis, ŝi adoris lin per tuta sia koro.

La ombroj de la pomarboj etendiĝadis orienten. Denove sonis la sonoriloj en la turo de la lernejo por blinduloj.

"*Par-par-par-par,*" sonis paruo.

Ie, tre for, la startmotoro de aŭtomobilo fuŝkriĉaĉis, fuŝkriĉaĉis, kaj eksilentis.

Catherine venis de sub sia arbo, genuiĝis apud Newt.

"Newt?" ŝi diris.

"H'm?" li diris. Li malfermis la okulojn.

"Malfruas," ŝi diris.

"Saluton, Catherine," li diris.

"Saluton, Newt," ŝi diris.

"Mi amas vin," li diris.

"Mi scias," ŝi diris.

"Tro malfruas," li diris.

"Tro malfruas," ŝi diris.

Li ekstaris, streĉis sin ĝemante.

"Tre agrabla promenado," li diris. →

"Ankaŭ mi opinias tiel," ŝi diris.

"Ĉu ni diru ĉi tie?" li diris.

"Kien vi iros?" ŝi diris.

"Mi petveturos en la urbon, cedos al policisto," li diris.

"Bonan fortunon," ŝi diris.

"Kaj al vi?" li diris. "Edziniĝu al mi, Catherine?"

"Ne," ŝi diris.

Li ridetis, fiksrigardis ŝin dum momento, poste formarŝis rapide.

Catherine rigardis lin malgrand-

iĝi en la longa perspektivo de ombroj kaj arboj, sciis ke se li haltos kaj sin turnos nun, se li vokos ŝin, ŝi kuros al li. Nenia alia ebleco ekzistis.

Newt ja haltis. Li ja turnis sin. Li ja vokis. "Catherine!" li vokis.

Ŝi kuris al li, ĉirkaŭbrakumis lin, ne povis paroli. □

[Traduko lingve redaktita de Donald Broad-ribb]

Winsome Greenhalgh

m. 20 oktobro 1993

nekrologon verkis Ray Ross

Subite mortis, la 20an de oktobro, 1993 Winsome Greenhalgh, fervora laboranto por Esperanto en Kvinslando dum multaj jaroj; UEA-delegito, ano de AEA, antaŭa estrarano de Brisbana Esperanto-Societo kaj poste dumviva membro. En 1970 Winsome starigis grupon kiu kunvenis ĉiun merkredmatenon en la propra hejmo en la antaŭurbo St Lucia. Winsome ĉeestis la inaŭguran kunvenon de la Esperanto-Federacio de Kvinslando, kaj ĝis la morto restis fidela membro; la grupo ĉe St Lucia gastigis du konferencojn de EPK en la okdekaj jaroj. Winsome multe kontribuis al la Aŭstralia Antologio per traduko de, plejparte, diversaj poemoj. La funebra ceremonio okazis en Brisbano, la 23an de oktobro, kiam anoj de BES kaj la St Lucia Grupo omaĝis al la memoro de unu el la elstaraj subtenantoj de Esperanto kaj amata samideano. Adiaŭ, Winsome Greenhalgh!


GRAVA AVERTO!

David Poulson ricevis de "firmao" en Nigero leteron, kiu diras ke li estis rekomendita al ili de eminenta esperantisto nigera, Jerry Osuji. Temas pri propono transsendi al la bankokonto de David multmilionojn da usonaj dolaroj, kiujn oni poste transmetos en alian bankon nenomitan; David ricevas procentaĵon. David tuj kontaktis la fraŭdpolicon, kiu informis ke tiaj leteroj estas amase ricevataj en Aŭstralio nuntempe. Se vi aŭ konato via ricevas tian leteron, tuj kontaktu la fraŭdpolicon. *Nepre ne* informu la skribinton pri viaj bankokontodetaloj. (NB Jerry Osuji havas nenian rilaton kun la afero; liaj nomo kaj adreso estis kopiitaj el letero sendita al li de David, ŝtelita el la poŝto.) □

NIA REDAKCIA STABO



La Redaktoro



Odlo Bokserp
(Fotita per nigra lumo dum senluma nokto)

Patrino: Mehitabel; Patro: anonoma

ALDONU AL VIA LIBROKATALOGO 1994

318: Kristnaskaj Kartoj (nigra/blanka); kovert. \$0.50

026: Insigno # 7 (Ronda broĉo 20mm) \$6.30

391: *Kanto pri Minotaŭro kaj Aliaj Poemoj* de Gerrit Berveling. 135p. 1993. \$23.30.

RECENZO




Jubilea Numero 1918 - 1993

Post iom pli ol duonjara paŭzo, *La Skolta Mondo* reaperis komence de 1993, lerte redaktata de Anna Margareta Ritamäki (✉ Peltolavägen 6 B 36, FI 20720, Åbo/Turku, Finnlando). Ĝi estas oficiala organo de Skolta Esperanto-Ligo, kun enhavo vere interesa por geskoltoj kaj skoltemuloj. En ĉi tiu numero 3/93 ni legas pri "Aktiva naturproksima agado por ekologia konscio", kiel ĝustamaniere bruligi fajron, kaj la

18-a Monda Ĵamboreo okazonta en Nederlando en 1995. Krome, la ĉisekve presita teksto de bone konata kanto *Auld Lang Syne*; kaj ne mankas distraĵoj kaj enigmoj kiujn gejunuloj multe ĝuos. Adreso de la peranto de Aŭstralio: Jennifer Dimo, 9 Rocky Gully Road, Coominya, QLD 43311; kaj en Nov-Zelando: G. Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.



Elegu la flamon



... por nia afero, laŭ la salutvortoj al SEL de la Esperanta poeto Kolomano Kalocsay en 1934. Jene ni publikigas niajn solenaĵojn kaj kantojn, bezonataĵojn por pluvivigi niajn tendar-faĵojn.

LA IAMO LONGE FOR


originala skota titolo: "Old long signe"



1. La pra-ko-na-tojn ĉu ni la-su vel-ki el me-mor'?
2. La kru-ĉojn do ni le-vu kaj sa-lu-tu el la kor',
3. Mon-te-te i-am ku-ris ni kaj ĉer-pis el la flor',
4. Ge-kna-be ni en flu-o va-dis ĝis ves-pe-ra hor',
5. Do jen la ma-no ka-ma-rad' ni pre-mu kun fer-vor',



1. Ĉu ni ne pen-su ka-re pri la i-a-mo lon-ge for?
2. Kaj trin-ku en kon-kor-do pro la i-a-mo lon-ge for!
3. Sed pe-nan vo-jon spu-ris ni post i-a-mo lon-ge for.
4. Sed ma-roj mu-ĝis in-ter ni post i-a-mo lon-ge for.
5. Kaj trin-ku ni pro-fun-de pro la i-a-mo lon-ge for.



I-a-mo lon-ge for, ka-rul', i-a-mo lon-ge for:



Ni trin-ku en kon-kor-do pro la i-a-mo lon-ge for!



- **World leaders salute Esperanto: Greetings to 78th World Congress, Valencia July 1993**—*The message from his Holiness Pope John Paul 2nd read:* "His Holiness sincerely greets the organisers and participants in the 78th Universal Congress of Esperanto taking place in Valencia and encourages them to continue their worthy efforts to bring into being a world where understanding and unity will prevail. At the same time the Holy Father urges participants, who represent different countries, cultures and faiths but speak a common language, to demonstrate by means of such a meeting the brotherhood which, without any kind of discrimination, should prevail among all men as members of the great family of the sons of God, and to confirm the personal and collective consciousness of being builders of peace in their home environment and society. With these desires and calling upon the protection of God for work of the Congress and those participating in it, His Holiness the Pope is pleased to extend the desired Apostolic Blessing."

From the staff of Boutros Boutros Ghali, Secretary-General of the United Nations, came the following: "I am glad to convey to you the thanks of the Secretary-General for your letter of the 24th October, for he always appreciates receiving news of organizations which, like yours, seek to further the aims of the United Nations. The Secretary-General praises the work of the Universal Congress of Esperanto which, through its valuable program and common language, is trying to unite the people of the whole world for an exchange of ideas and to create an ethos of understanding. He takes this occasion to congratulate all participants in the 78th Universal Congress of Esperanto and hopes that it will be most successful."

Federico Mayor Zaragoza, Director General of UNESCO, sent the following telegram: "It is with great pleasure that I send warm greetings to the participants in the 78th Universal Congress of Esperanto. UNESCO regards as particularly important its relations with the non-governmental organisations which represent the world community of thinkers—among them UEA—because we share a common ideal of a better and more equal world and because the non-governmental organisations are the natural fellow workers with UNESCO at all levels, worldwide, by continents and on a national scale. Particularly gratifying for UNESCO was your choice of congress theme. UNESCO recently established an international commission on education for the Twentieth Century, with Jacques Delors as Chairman. On the threshold of a new millennium, there are few more important tasks than the creation of an educational system which will respond to the multiple and interlinked challenges of an integrating world society, including the spreading of consciousness of the absolute necessity for humankind to learn to live together in a family circle and in

harmony with world ecology. I am certain that your discussions will make a valuable contribution in this connection, and I should be grateful for a report on your congress which I should be glad to make available to the Delors Commission. I wish all participants a pleasant stay in Valencia, and I assure you that UNESCO rates highly your important endeavours to join in the construction of a world in which cultural diversity will not hinder a wider unity on the destiny of Humankind. [From *UEA/esperanto* Sept. 1993; translated by Ralph Harry.]

- **Chinese poetry:** The first book of poetry from China originally written in Esperanto was published last year. Although China boasts several expert Esperantist poets, until recently all published poetry was translations from the Chinese, perhaps because of censorship regulations. The new book, *Poemoj de Armand Su*, is an anthology of poems largely published previously in a variety of Western Esperanto magazines.
- **Chinese youth:** the Chinese Youth Esperanto Association was established last March in Peking, with 300 founding members. Six members of the Directing Committee of the association are professional Esperantists working in Chinese Esperanto publishing activities and in China Radio International. [From *tejo tutmonde* Oct-Dec 1993].
- **Esperantist youth congresses:** this year's international Esperantist Youth Congress (IJK) will be held in the university town of Ch'ōnan, South Korea. The 1995 Congress will be held near Saint Petersburg in Russia. [From *tejo tutmonde* July-Sept. 1993.]
- **Computer game:** A game program for IBM-compatibles, named *Serĉu: Angela L.* "for experts and beginners in geography" is available for 8 German marks (about AUD \$8, NZ\$10) from Marcus Sikosek, Kampstr. 75a, 45966 Gladbeck, Germany. [From *Esperanto Aktuell* 4/93.]

UNIVERSITY DISSERTATION ON PROVERBS

An interview with Ewa Krach by Andrzej Pettyn, director of the Esperanto Section of Radio Poland.

A new staff member of the Esperanto Section of Radio Poland is Ewa Krach; she is a student in the faculty of applied linguistics at Warsaw University. She will complete her studies in mid 1994 and will then take up work as a professional journalist in the Esperanto section of Radio Poland. We present a transcript of an interview with Ewa, broadcast recently. We hope it will be of interest to some of our listeners.

What brought you to begin working with the Esperanto section of Radio Poland?

It began rather unexpectedly during my work experience with the Esperanto section. Every student has to have language work experience. Since I have long had an interest in Esperanto, I asked if I could do it with you. When this was approved, I began to visit the section frequently, do various jobs etc. Bit by bit I noticed that journalist work in Esperanto was becoming increasingly attractive to me, because my interest in the language was growing at the same time.

Did that influence your decision to make use of Esperanto in parts of your Master's thesis?

Yes, of course. I have long been interested in the comparison of proverbs in various languages. Finally I proposed to my professor the topic "Structural Types of Proverbs in Polish, Russian, French, Esperanto, and other languages".

Did your professor give immediate permission for you to include Esperanto?

Yes. He even—I must say it was a surprise to me—accepted the idea with considerable enthusiasm. He said it could prove very interesting. So I began to collect research material, and then I found that though I had plenty of material in Polish, Russian, and French, I only had Zamenhof's *Proverbaro* in Esperanto.¹ Of course this *Proverbaro* is quite extensive and useful, I will certainly make good use of it, but that is all there is in respect of Esperanto.

And then I began to doubt, to hesitate, whether or not to continue, whether to change the topic...

No doubt you remember that I was the first to urge you to continue and I promised to give you some help in collecting further material. I had the inspiration that perhaps some of our listeners could help you, but we will talk about

¹L.L. Zamenhof was the initiator of Esperanto. In 1905 his father, Markus Zamenhof, began publication of "A Parallel Russian-Polish-French-German Phraseology, or A Collection of Proverbs, Maxims, and Sayings in the four languages. Compiled by M.F. Zamenhof, teacher emeritus at the Warsaw School of Secondary Education. Recommended by the Ministry of Public Education, for Elementary and High School Libraries." The proverbs etc. were presented in four columns, arranged in alphabetical order according to their Russian versions. While parts one and two of this work were being printed, [L.L.] Zamenhof felt that something similar was lacking in Esperanto. He proposed to his father to add a fifth column in the international language. Markus Zamenhof enthusiastically added a fifth, Esperanto, column, and part three of the work was titled *A Comparative Russian-Polish-French-German-Esperanto-Latin-Hebrew Phraseology*. The last two parts were never published, due to the author's death, but the son completed his adaptation and had it published in a single volume by Hachette, Paris, in 1910. [From the "Introduction" by Gaston Waringhien to the 1974 edition of *Proverbaro Esperanta* by L.L. Zamenhof, published by Stafeto, La Laguna (Canary islands).—Ed.]

that later. Tell me, first, what are you doing at present to complete your Master's dissertation?

At the moment I am engaged in classifying the proverbs from a lexicographical and grammatical point of view, comparing the structure of proverbs in various languages, with special consideration to lexicographical opposites: work—idleness, goal—result, work—result.

Tell me how our listeners could help.

If possible, I would like to receive sample proverbs from various languages, written clearly in their original language and accompanied by an exact Esperanto translation, following the same themes mentioned. I would also be interested, if there are any, in original proverbs created in Esperanto, originated by speakers and writers etc. of Esperanto.

I am quite sure you will receive these. But explain exactly what you need...

From the lexicographical point of view, I need proverbs from the following three structural groups:

- 1) One thing is the result of another. For example: "Where there's smoke, there's fire"; "If there's light, there's also always a shadow".
- 2) A person or object has some particular trait: "Everyone to his own taste"; "Every tailor has his own cut".
- 3) Reciprocal relations between objects or persons, depending on their individual traits: "Two Poles, three viewpoints".

I would like to know whether proverbs of this sort exist in other languages, and I would like examples of such proverbs along with Esperanto translations. Also, I would like to learn whether anyone knows what languages contributed most of the Esperanto proverbs. Are there any publications on this in the Esperanto literature?

I hope, Ewa, that some listeners can help you, but, if, for example, those specific points could not be covered...?

Then I would like to receive some of the most popular proverbs in any national language, along with the Esperanto translation. I would be particularly interested in receiving proverbs from Australia!¹

That's certainly easy enough. Let me add that correspondence on paremiological topics (paremiology = the science of proverbs) can be sent to: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, atn. Ewa Krach, 00-950 Warsaw, Box 46, Poland. I hope that Ewa will receive replies by the end of March 1994 when she will be finishing her dissertation.—Andrzej Pettyn. [Translated by Donald Broadribb]

¹This last comment was written in by hand in the transcript sent us.—Ed.



LINGVA ANGULO

de ALAN TOWSEY

De S-ino P. Harkin, el Leopold (Viktorio), mi ricevis demandon pri la uzo de la verbformo: "Ĉi sidantis tie" (anstataŭ: "Ĉi estis sidantaj tie"), kaj similaj, kiun ŝi vidis en *Sep Krimnoveloj* de Ronald Gates. Fakte, antaŭ kelke da tempo Profesoro Gates mem diskutis ĉi tiun formon kun mi, kaj mi konsilis, ke li uzu ĝin senhezite laŭ sia bontrovo por variigi la stilon de tempo al tempo, se li en iuj kazoj trovos tion preferinda.

La uzado de ĉi tiu verbformo iniciatiĝis jam en la fruaj tagoj de Esperanto, tiom ke Zamenhof mem respondis al demando pri ĝi en *La Revuo* de Aprilo 1907 (vidu *Lingvaj Respondoj*, p.62. [=p.39 en la eldono de Sezonoj 1992]). Laŭ Zamenhof: "La formoj 'amatas', 'amitas' ktp., anstataŭ 'estas amata', 'estas amita', per si mem ne prezentas ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone uzi ilin. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia *propra* iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tiu okazo, se 'as', 'is' ktp. signifus 'estas', 'estis'; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo 'esti', tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon *ne* havas."¹

Nu, tion li skribis antaŭ pli ol 80 jaroj. Depost tiam multe da akvo subfluis la ponton. Pluraj verkistoj eksperimentis je la uzo de *as* kaj *is* por *estas*, *estis*—precipe en la poezio—sed oni preskaŭ neniam trovas ilin nuntempe. Tamen oni ofte vidas formojn, kiaj "Necesas ke..." (= Estas necese); "Li bone sanas" (por "Li estas bonsana"); "Por kio ĝi utilas?" (= ...ĝi estas utila)—eĉ Zamenhof uzis ĝin: "Ne ĉio utilas, kio brilas" [*Proverbaro Esperanta*, 1974a eldono, n^o 1613]—kie la finiĝo *-as* evidente anstataŭas *estas* kun adjektivo, kaj ne malofte oni ja renkontas la formojn "Ĉi sidantis" (= estis sidantaj); "Li povintus iri" (= Li estus povinta iri - He could have gone).

Pri ĉi tiu uzado, *Plena Analiza Gramatiko* diras (§ 102): "Tia kunmetado

¹Kvankam ne volonte kontraŭante la iniciatinton de nia lingvo, mi opinias ke Zamenhof grave eraris pri la signifo de "as". "is", ktp., en ĉi tiu rilato. Laŭ mia lingvosento, tiuj "finiĝoj" uzatas por verbigi kaj nenio pli. En la vorto "rigardas" la "-as" havas neniun sencon de "estas", kaj same en *amatas* la "-as" havas neniun sencon de "estas". La supozo ke "-as" signifas "estas" en tia esprimo estas pro influo de eŭropaj lingvoj kiuj konas nur formojn kiajn "He is loved" kaj havas neniun ekvivalenton de "li amatas". En la klasika Hebrea lingvo, kiun Zamenhof bone majstris, ekzakta ekvivalento de "li amatas" ja ekzistas, נאהב, kaj mi miras ke li ne konsciiĝis pri tio kiam li verkis ĉi tiun respondon, ĉar la esperanta verbsistemo estis fundamente modelita laŭ la klasika hebrea sistemo—kaj estas unu el la plej geniaj partoj de la esperanta gramatiko—Rcd.

estas tiel konforma al la konstruo de la lingvo, ke ĝi estis plurfoje kaj plurorigine proponita. Tamen ĝi neniam prosperis en la komuna lingvo, pro la malfacilo de uzado kaj komprenado...”

Oni atentu tiun lastan eldiraĵon: “pro la malfacilo de uzado kaj komprenado”. Precipe pro tio, oni ne ofte aŭdas ĉi tiujn formojn en konversacio, sed en skribita aŭ presita teksto, lerte kaj ŝpareme uzate, ili kutime ne prezentas malfacilaĵojn, kaj ebligas bonvenan variigon de stilo, plikoncizigon de la frazo, kaj povas ankaŭ esti tre utilaj en la poezio.

>>>><<<<

PREPOSITIONS

The correct use of prepositions in any language presents difficulties for every learner. Esperanto is no exception. Conventions have arisen, and rightly so, in order to preserve some consistency of usage. In most cases, fortunately, these have been based on logic, though not always—sometimes the influence of certain national languages has been decisive. Zamenhof expected, I think, that users of his language would, as far as possible, use logic in their choice of prepositions, each of which has in Esperanto a definite, fixed meaning. But, of course, there are cases where it is difficult to decide just what is the most logical choice. To meet such contingencies, Zamenhof gave us the preposition *je*, which takes its meaning from the context, and further, allowed the preposition to be replaced by the accusative.

These last two alternatives are mainly, but, of course, not exclusively, used with expressions of time: *Mi alvenis mardon/je mardo. Ni alvenos la duan de/je la dua de decembro. Je kioma horo vi alvenos? Je la dua. Mi restis tie du tagojn/dum du tagoj.* And so on. But over-use of *je* should be avoided.

Even the accusative after words expressing motion towards can be accounted for by supposing *al* to be omitted: *Kien (= al kie) vi iras? Li metis la libron sur la tablon (= al sur la tablo).*

It would take many pages to list all common uses of the prepositions, and the list would never be complete. The following is just a selection of some of the more common uses:

danki iun (better than *al iu*) *pro io.* (Zamenhof preferred *danki por.*)

N.B.: *Ĉu iom pli da kafo? Mi dankas (= Ne!).*

helpi iun/al iu—But: *rigardi = look at; serĉi = look for.*

konsisti el. profiti de. ridi je. la plej fortaj el ĉiuj. du el la plej fortaj. multaj el miaj amikoj.

fari ion el io. rakonto el la Biblio. sciigi el la gazetaro (learn from the press). *traduki el la franca. el mia tuta koro. el la memoro.*

gratuli pri/pro. preferi al + substantivo/preferi ol + infinitivo. →

pagi grandan sumon al iu por io. N.B. pagi kalkulon/manĝon, serviston.
pagi per mono/kontante (in cash).

aĉeti ion de/disde iu por/kontraŭ dek cendoj. distingi ion disde io alia.

preni/kapti/teni iun je/ĉe la brako per la dekstra mano.

sopiri ion or al/je io.

La pomoj kostas unu dolaron por funto/la funton.

longa du metrojn/je du metroj.

proksime al/malproksime de. paŝon post paŝo (step by step). vizaĝon
kontraŭ vizaĝo (face to face). vizaĝon ĉe vizaĝo (cheek to cheek).

fiera pri. sur la ĉielo (in the sky). en la ĉielo (in heaven).

sin ŝanĝi en -n. morti pro siaj vundoj/de malsato/per la glavo/pro la
patrujo.

tremi de febro. paliĝi de kolero. ebriiĝi de vino. plena de. dependi de.

bati per la flugiloj (beat its wings). frapi je/al la pordo. La Eternulo
frapos vin per ulceroj. N.B. frapi iun senviva (strike dead).

grimpi sur arbon/monton. (It is difficult to justify the omission of the
preposition here, since the accusative of motion is already in use!)

depost lia morto (since his death). ekde tiu momento (ever since that
moment). Mi estas ĉi tie de lundo (have been here since Monday)/de tri
tagoj/jam tri tagojn (for three days). Mi restis tie tri tagojn/dum tri
tagoj.

tro laca por plu labori.

La timo de la kaptitoj al siaj kaptintoj. La komenco de la saĝo estas
timo antaŭ la Eternulo² (*Sentencoj*, 9:10). la amo de patrino al
sia infano.

perfido de iu kontraŭ iu pro io.

liuj sonoj, kiujn povas aŭdi hundo, ne estas aŭdeblaj por ordinara homo.

Finally, note that the preposition after the passive is *de*—not *far*.¹ In case
of possible ambiguity, use *fare de*, or *disde*, according to circumstances,
e.g.:

la instruado de la infanoj fare de profesiaj instruistoj.

la traduko de Hamleto fare de Zamenhof.

infano forprenita de la polico disde la patrino.

¹*Aktoj de la Akademio III (1975-1991)*, p.73, quoting “6-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko.” A footnote indicates that the Academy was split about 50-50 *re far*, and so, while not rejecting it outright, does not recommend it.

Topless and Speed Bump/hump

The following suggestions have so far been sent in by readers—all well thought out. Any others that arrive too late for this issue will appear in the next.

Dr Donald Broadribb (our learned editor): senĉemiza; strattubero, rapidtubero.

Mrs Patricia Harkin: mamparada; malakceligaĵo. (Patricia also sent a cartoon and for this suggests “senkapulino”.)



Brian Fox (N.Z.): nudbrusta; vojĝibo. (Brian was staying in Australia at the time at the home of Gaye Phillips, who suggested “nudmama”, of which Brian says: “I think hers carries the flavour of it, referring specifically to females.”)

Prof. Ron Gates: nudtorsa (“malgraŭ ke, el la vidpunkto de la klientoj... estus eble pli trafa ‘nudbrusta’.”); malrapidiga vojĝibaĵo.

Trevor Steele: nudtorsa; (Trevor didn’t offer a suggestion for “speed hump.”)

Interesting that we all seem to be thinking along the same lines!

HOMARANISMO

La mondkonata verkisto Umberto Eco diris: “Kompare kun aliaj projektoj de internacia lingvo, malantaŭ Esperanto staras iu ideologio, kio klarigas kial ĝi eltenis dum la aliaj fiaskis. Ekzistas Esperanta ‘religio’, kiu igas homojn lerni kaj paroli la lingvon, dum ne ekzistas ‘religio’ de Volapük aŭ de Ido. La anglan oni lernas nuntempe pro praktikaj kaŭzoj. Sed povas ekzisti ideaj

instigoj kiuj decidigas lerni lingvon, kaj ili estas fortaj.” “Mi uzis la vorton *ideologio* en tre larĝa senco: aro de ideoj, de opinioj.”

Info-Servo preparas *Tutmondan Homaranistan Adresaron*. Se vi deziras registriĝi vian adreson en tiu ĉi adresaro, bonvolu sciigi vian adreson al: Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-35037 Marburg, Germanio. □



[Ĉi tiu estas vere la plejplejlasta komentario pri ĉi tiu temo en ĉi tiu gazeto.—Red.]

Surprizis min la apero en la septembra-oktobra numero de *ESK* (p.19) de akra respondletero de Rik Dalton al poemo, kiun mi verkis. La redaktisto informas, ke li intencas fermi per ĝi la aferon. Tamen ŝajnas al mi, ke mi rajtas je repliko, kaj mi esperas, ke ne okazos, kiel en 1992 en *Novzelanda Esperantisto*, kie s-ro Major senigis min je la replika rajto.

Tiutempe mi ja legis lian originalan tekston, kiun mi ricevis kopie de amiko. En ĝi s-ro Major malmilde insultis ne nur min kaj miajn ŝatatajn aŭtorojn (unu el ili, Karolo Piĉ, travivis nazian koncentrejon, pri kio li rakontas en *La Litomiŝla Tomb-gjo*), sed ankaŭ la redaktistojn de Ĉina esperanto-revuo. Tial mi miras, ke s-ro Dalton reelstarigis tiun ĉi makuleton en la biografio de Jozefo Major. Ni tamen ne parolu plu pri mortintoj kaj vortoj de mortintoj. Mia tiama peko estis traduki politikan tekston; cetera la ilustraĵon (verdire nur obscenetan) mi vidis nur post la eldono.

Rik Dalton pretendas, ke mi nepre devas esti simpatianto kaj dungito de islamaj fundamentistoj nur tial, ke mi kontraŭas la politikon de la antaŭa israela registaro koncerne palestinanojn. Kiel skribis la palestina orientologo Eduard Said, *por domini materie la aliularon, estas konvene trakti image ties multecon kiel unuecon*. Por Dalton la tuta arab-islama popolanaro estas nur unu amaso da nedistingeblaj kanajloj. Male, mi konscias la diversecon, la individuecon de palestinanoj, de judoj aŭ de katalunoj. Mi abomenas s-rojn Bush, Jelcin, Sadam Hussein, Karaĝiĉ kaj Samir, sed pri unuopaj usonanoj, rusoj, irakanoj, serboj aŭ israelanoj mi ne havas gente kunigan opinionon.

Mi rediru plian fojon, ke mi daŭre opinias antisemitismon kaj flosemitismon same absurdaj, kaj ke mi abomenas ĉian formon (pozitivan aŭ negativan) de rasismo, ŝovinismo kaj patriotismo, ĉar ili impresas min kiel du nur ŝajne kontraŭaj flankoj de unu sama monero. Tial mi bonvenigas (eble naivule) la interkonsenton inter la israela kaj la palestina registaroj pri la komenca aŭtonomeco de Gaza² kaj Jeriĥo, kaj senhezite tenas min for de ekstremismoj antisemitaj, antijudaj, antiarabaj kaj antipalestinaj. Mian opinionon mi klare jam esprimis per la poemo *Monologo kun Mediteraneo*, ricevinta la unuan premion en la poezia branĉo de la Belartaj Konkursoj de UEA en 1993 (aperanta en la novembro numero de *Esperanto*), kaj en ĉapitro de la satira novelo *La Majstro kaj Martinelli* (2a eld. ĉe *Iltis*, 1993). Bedaŭrinde Rik Dalton ne estas la unua, kiu ne povas aŭ ne volas kompreni mian sintenon kaj do min kalumnias; precedentoj de malica (foje eĉ dola) buŝo troviĝas ĉe (ge)sinjoroj Major, Ŝemer, Ŝulco, Silfer kaj Ari-Martinelli (interesiĝantoj legu la artikolon *Kion prisilentas Literatura Foiro?* en la n-ro 15 de *Survoje*).

Al ĉiuj ceteraj mi deziras tre agrablan julon.

Ĝis revido en Jeriĥo, via

Georgo Kamaĉo (Hispanujo).

KOREKTO KAJ PROTESTO DE GONÇALO NEVES

En artikolo de Max Wearing pri la 12-a ILF okazinta en Barcelono (*ESK* 5, 1993, p.12-13) mi trovis plurajn misdirojn pri la devenlando de kelkaj partoprenantoj.

La prezidanto Antonio Valén estas ne kataluno, sed hispano) kvankam li fakas ankaŭ pri la kataluna lingvo). *Ibere Libere* estas ne antologio sed mempulsa poemaro, kiun kunverkis (ne kompilis) kvar iberaj poetoj: tri hispanoj (Miguel Fernández, Georgo Kamaço, kaj Liven Dek) kaj unu portugalo (Gonçalo Neves). Do neniu kataluno inter ili!

Sespafe la artikolisto trafis nur unufoje, pri la preleginto Abel Montagut, kiu ja estas kataluno. El tiela informiteco oni povas konjekti kiom fidindas lia konkluda vitriolo pri la komentoj kaj prelegoj de la iberaj aŭtoroj...

RECENZIMPRESO PRI DU PROGRAMOJ DISSENDITAJ EL RADIO 3ZZZ MELBURNO DE VERA PAYNE

(Enkasedigitaj por Vera Payne de Svetislav Kanački)



Tuj trafis miajn orelojn la plej ĉiela voĉo kaj muziko el Brazilo de bone konata franca kanto por infanoj;

la kantistino estas Franca Fenati, kaj miaj koro kaj animo respondis tuj. La celo de la unua programo estis atentigi pri la Radiotono kiu okazis de la 9a ĝis la 17a de oktobro 1993, por elvoki donacetojn por Melburna Multkultura Radio, pro tio, ke la registara subteno por etna radio-dissendo malkreskas.

La Esperanto-programon ĉiusemajne prezentas kune Svetislav Kanački kaj Jennifer Bishop, kies

du voĉoj bone kontrastas unu al la alia. Krome, ambaŭ estas tre klaraj laŭ prononco, tiel ke nenium vorton mi perdis.

Leciono 10 de *Jen Nia Mondo* estis iomete fuŝita pro bructo en la fono; mi ankaŭ scivolas ĉu la aŭskultantoj rigardas dum la programo la *JNM*-libreton—se jes, estis neniu reklamo por la aĉeto de la libreto, se ne, al kiuj la lecionoj celas?

Subite venis la “vida” voĉo de Max Wearing, el Adelajdo. Li parolis pri la Ago-Tago kiu okazis je la 1-a de aŭgusto dum plurtaga seminario ĉe la Universitato de Ade-

lajdo, inter 70 lingvistoj. Juĝisto Kep Enderby flugis el Sidnejo por fariĝi la ĉefparolanto por la Internacia Lingvo. La afero estis aranĝita de Bill Menari, lekciisto pri la skota kaj la skandinavia literaturoj en la universitato. Pro liaj klopodoj, la lingvistoj restis multe pli bone informitaj pri Esperanto, kaj ke Kep bone impresis ilin montriĝis en la fakto, ke tute mankis la kutimaj stultaj antaŭjuĝoj, sed inteligentaj demandoj abundis. La bela ekspozicio de Ruth kaj Gerald Tummin estis videbla kaj tiam kaj ankaŭ dum la Ekspozicio pri Edukado, en septembro. Max atentigis ankaŭ pri la venonta Somerlernejo, kaj informis, ke jam sin registris homoj el Nederlando, Usono, Germanio, Kroatio kaj Tajlando.

Jennifer legis interesan artikolon pri geedziĝo en Ĉinio, kaj Svetislav parolis pri la Nova Partio kaj la rolo de Esperanto en ĝi. Estas bona ekvilibro inter la angla kaj Esperanto en ĉi tiuj programoj. Ĉi unua finiĝis per ĉarma rondkanto "Frato Joĉjo".

La dua programo okazis dum la Radiotono, kaj inter la eroj Jenny kaj Svetislav anoncis la donacantojn. El Kvinlando venis \$50,

ĉar la samideanoj tie iel eksciis pri la Radiotono. (Kompreneble estis multaj Melburnanoj kiuj kontribuis aŭ individue aŭ klube.) Venontjare kial ne fari grandan anoncon pere de *ESK* kaj leteroj al la diversaj kluboj, *antaŭ* la afero, por ke ni ĉiuj povu fari etan donacon al ĉi tiu inda kanto?

Plaĉis al mi "Hieraŭ", la fama kanto de la Beatles, bele kantita de John Douglas, kvankam la fonmuziko iom tro laŭtas por mia gusto. Ke la programo estas ĉarme ne-tute-profesia, sin anoncis kiam naneca voĉo komencis kanton; subite (kaj feliĉe) la malĝusta rapideco ĝustigis, kaj jen tute normala vira voĉo regalis nin. La dolĉa voĉo de Margaret Hill ankaŭ plaĉis. "Landlimoj" verkita de Marjorie Boulton kaj deklamita de Nikola Rytkov mi trovis iom tro intensa, peza, malmoderna sur miaj oreloj—sed mi aŭskultis kritikeme, kaj eble ne multaj akordiĝas kun mi. Tre impresa poemo pri Bestoj, Bestetoj kaj Bestegoj finis la programon.

Mi tre bedaŭras ke mi ne povas aŭdi la programon ĉiusemajne. Pli belan komplimenton ol tiun mi ne povas doni al Svetislav kaj Jennifer. Entute, gratulinda laboro. ┘

PAROLAS VARSOVIO EN ESPERANTO

Pola Radio jam de multaj jaroj brodkastas en Esperanto per mallongaj ondoj. Dumaĝe, ili ne estas aŭdeblaj en Aŭstralazio—Bedaŭrige, ĉar ni en Aŭstralazio preskaŭ neniam havas oportunon aŭskultadi bonkvalitan parolatan Esperanton, kaj *ĉiutage!* Ĉu eble peticio al la Esperanto-sekcio de Pola Radio sufiĉe atentigus ilin pri sia mankanta "aŭskultantaro"?—Intertempe, se vi havas amikon aŭ parencon en Pollando kiun vi deziras saluti Esperante, la regula pola esperanta

programo "Koncerto kun bondeziroj" disaŭdigas salutojn de alilanduloj. Nur skribu al "Koncerto kun bondeziroj", Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, 00-950 Warsaw, Box 46, Pollando. Klare preslitere skribu viajn nomon kaj adreson, kaj la nomon kaj adreson de la salutoto (ĉar oni skribe antaŭavizos ĉi tiun pri la dato kaj tempo de la saluto), kun kelkvorta mesaĝo laŭtleĝota. Ne preskribu aerpoŝte, kaj plurajn semajnojn antaŭ la dezirata dato! □

IMPRESOJ DE BICIKLADO EN AŬSTRALIO

DE ANITA BERGH

*Abunda kreskaĵo. Ĉio malsimilas.
Malhelas je la 18-a.
Elleviĝo kun la suno kaj la birdoj je la 6-a matene.
Dormi sub la libera ĉielo.
Frosto sur la kampoj kelkfoje matene.
Varme en la dormosako.
La stelĉielo mirinda. La Suda Kruco kaj la lunlulilo.
Bruo de diversaj bestoj nokte.
Pendigi la manĝaĵon sur arbojn.*

*Gruzaĵoj serpentumas. Grandaj kaj etaj ŝtonoj.
Krutaj randoj kaj kapturnaj vidindaĵoj.
Necesas teni la okulojn sur la vojo.
Halti por foti kaj rigardi.
Malfacile malsupreniri. Duraj bremsoj, mallongaj teniloj.
La dikfingroj doloras kaj la maldekstra mano krampas.
Malfacile suprenpuŝi la biciklon.
Ŝarĝo nur malantaŭe. Malekvilibro.
Facile daŭre suprenbicikli post halto.*

*Nealkutimiĝinte uzi la stirilon "Ŝimano".
Bonaj ŝuoj. La pedaloj nesentebaj.
Laciĝis femuroj kaj suroj post la monto de Averta. Nur tiam.
Iomete la nuko doloris de forta bremsigado. Ne, ne longe.
Ĉiam mi reĉerpis fortojn tuj.
Pli kaj pli ofte mi superas la deklivojn.
Mi enritmiĝis.
Peza estas la unua kilometro.*

*Trinki multe da akvo kutime kun citrono.
Solida matenmanĝo, solida vespermanĝo.
Nuksoj, sekvinberoj, bananoj, ĉokolado, buterpano, avokadoj, tomatoj.
Kolekti lignon por la fajro.
Eŭkaliptbranĉoj estas la plej bonaj.
Prepari manĝaĵon sur la fajro en "billies".
Legomoj, rizo, pastaĵoj, kafe kaj halvao.
Propra telero kaj propra manĝilaro.*

Akvofaloj kaj ornitorinkaj.
Vespere duobla stelĉielo.
Malhela kun la lampoj de la valo.
Pli hela kun la Suda Kruco kaj la Lakta Vojo.
Sunleviĝo malantaŭe la monto [n?] de Averno.
Brila, grandioza!
Honorigite esti la unua vidi la sunon.

La birdoj kantis por ni en la pluvarbaro.
Malvarme en la ombro, varme en la suno.
Afablaj homoj. Aŭtomobilistoj mansalutas. Ĉiuj salutas.
Agrablege bicikli.
Bona sento.
La pejzaĝo ŝanĝiĝis en la valo.
Densfoliaj ondiĝantaj, verdaj kampoj.
Bovinoj, ĉevaloj, azenoj, ibisoj. blankaj birdoj inter la brutaro.
Makademia-nuksplantacioj, sukerkankampoj, banankulturejoj.

Vendejo kun malnovaj laboriloj, maŝinoj. Kampara vendejo.
Ladmalfermilo frenezeta.
Manĝaĵprovizo dividita inter ĉiuj.
Plenigi la akvohotelojn zorgeme.
Ruĝaj algoj en la mia.
Kolekti sovaĝajn citronojn laŭ la vojo.
Frukto estis vendata ĉe la vojo. Prezmankoj kaj monkolektujo.
Fruktokultivisto regalis nin per fruktoj. Avokado sur pano, papajo.
Grandegaj pecoj! Bongustege!

Jam mi alikutimiĝis bicikli alte en la montaro.
Vertiĝodonaj profundegaĵoj.
Mi vidis birdojn, kanguruojn kaj lacertojn,
La monto de Averno sekvis nin.
Malmultis la trafiko survoje. Troviĝis ŝildoj "nur 4 rondoj".
Reaperis asfalto sed pri kurtaj deklivoj sole.
Bicikli en mallumo. Feliĉe sukcese.
Timige sur granda vojo. Veturi sengarde.
Grandegaj ŝarĝaŭtoj blindigis min.

Fromaĝkukoj kaj fiŝo kun terpomoj en Brunswick Heads.
Ebrigi bicikli sen ŝarĝo sur ebena tereno.
Naĝi en la maro. Grandaj ondoj.
Subtila sablo, longa strando. Herbstolonoj tenas la sablon. Arbetoj.
Trove holikojn.
Tipa biciklo-sunbruno.
Vespermanĝo ĉe la akvo kaj la fajro la lastan vesperon.
Sub la Suda Kruco kaj la luntulilo.
Lasta nokto sub la libera ĉielo.

□

BALBUTANTOJ DE KO NURMI

Antaŭ nelonge vizitis min ĵurnalisto por verki artikolon pri Esperanto. Grava vizito, ĉar jam antaŭe montriĝis ke ne necesos defendi nian lingvon: temas pri amiko de nia lingvo. Dum la konversacio mi konstatis ke la vizitanto laŭspirite estis Esperantisto, kiu tamen forlasis la movadon. Kial? Kio okazis?

La tre okupita persono iam konatiĝis kun Esperanto, kaj eklernis ĝin. Sed lingvon oni devas ekzerci per la uzado. Do: li aliĝis al klubo, kaj liberigis sin de ĉiuj aliaj taskoj dum du vesperoj en ĉiu monato por viziti Esperanto-grupon. Sed kia elreviĝo!

Inter samlingvanoj la uzo de Esperanto tute ne necesas kaj tial oni parolis nur nacilingve. La klubo tiel degeneris ĝis "spabo": Societo por Agrabla Babilado, kaj la klubanoj restis la fifamaj "eternaj komencantoj" kapablaj nur al infaneca babilado kaj balbutado.

Se iu volas pravigi tion per la fakto ke ĉeestas novuloj, kiuj ne jam ĉion komprenas, mi memorigas pri poemeto kiun mi trovis en eta libreto *Pluk* de Poul Thorsen, eldonita jam en 1960:

Se ni pro la novuloj
nacilingve en kluboj parolas,
laŭ similaj reguloj
lerni naĝon sen akvo utilas.

Kiom grava la problemo estas mi konstatis dum jarkunveno de landa asocio, kie oni petis permeson diskuti nacilingve—kio poste (alme-

naŭ parte) okazis.

En la Biblio, krom religia libro ankaŭ fonto de saĝeco, mi trovis en la Evangelio de Sankta Mateo la tekston: Se la salo sengustiĝas, ĝi jam taŭgas por nenio krom por esti forĵetata!

Vortoj kiuj nepre validas en nia epoko, en kiu tiom da principoj malaperas, kaj tiom da koloroj paliĝas. Espereble la grava averto kiun tiu teksto enhavas estos komprenata. Se ne, la demando restas: kiom nia lingvo valoras eĉ por ni mem?

[Represita el *La Brita Esperantisto*, kiu siavice represis ĝin el *Fenomeno* junio 1992.]

[Noto de la redaktoro: ĉi tiu problemo ne rilatas nur al Esperanto-grupoj, sed al ĉiuj grupoj de personoj studentaj specifan fremdan lingvon, ekz. la francan, germanan, kc. Ĉar ĉilastaj studentoj tamen konscias ke la celo de la grupo estas pliperfektigi la kapablon uzi la lernatan lingvon, en tiaj grupoj oni firme malpermesas paroladon en alia lingvo ol la lernata. Ĉu Esperantolernantoj do malpli ol ili fervoras kapabli uzi sian lernatan lingvon? Mi emas opinii ke tre, tre ofte Esperantolernantoj ne vere serioze pririlatas sian lernatan Esperanton. Por ili, tro ofte, la aliaj lingvoj estas "veraj lingvoj" sed Esperanto estas nur "hobio".] □





DIVERSAĴOJ



- **Konkurso—La mistera vorto de la jaro:**

En Internacia Ĵurnalisti 4/93, p.10, ni legas "Eminagiante la premion en Valencio al redaktoro Andrzej Pettyn..." Al tiu el niaj legantoj kiu proponos al ni la plej spritan difinon de tiu nova vorto, Odlo Bokserp sendos specialan, sekretan premion. Limdato por ricevo de difinoj: 25 februaro.

- **La fuŝvort-premio de la jaro tamen** devas esti aljuĝita al *Moskva Gazeto*, kies januara (1993!) numero atingis nin fine de novembro... En ĝi ni legas pri la "Internacia Instituto de bizneso kaj juro en Donbass". Eble ĝiaj studentoj de "bizneso" ankaŭ lernas iom pri komercado, aŭ eĉ negocado. Pri tio oni ne informis...

Prezaj: Ni ofte devas informi pri la prezo de libro, eldonaĵo, aŭ io alia, en niaj recenzoj kaj aliloke en ĉi tiu gazeto. Ĉar la valoro de la aŭstralia dolaro, kaj ankaŭ la novzelanda dolaro, nuntempe variadas ĉiutage, ni ĝenerale uzas formulon ke unu nederlanda guldeno proksimume = \$1 aŭstralia aŭ novzelanda. La libroservo aŭ gazetperanto povas pli precize indiki prezon kiam temas pri specifa mendo. Aŭstralianoj notu ke por sendi monon al Eŭropo, plej malmultekoste estas peti nian libroservon pagi per sia konto

ĉe UEA al la koncerna esperanta entrepreno, kaj vi mem pagu al nia libroservo per aŭstraliaj dolaroj. Tiel oni evitas ekstrajn bank- kaj/aŭ poŝtmandat-kostojn. Farante tion, nepre perletere informu la pagoton en Eŭropo ke vi tiel transsendas la monon.

- **Sed Nur Fragmento:** Georgo Kamaĉo, unu el la plej talentaj ĉigeneraciaj verkistoj, listigis inter la tri aparte elstaraj el la dek plej bonaj originalaj esperantaj verkoj la romanon *Sed nur Fragmento* de nia talenta verkisto Trevor Steele. (*El Brita Esperantisto* Nov-Dec 1993).— Trevor Steele devas multe veturadi pro sia nova posteno en la Norda Teritorio, kaj li petas ke kiam oni skribas al li, oni skribu c/o lia filo David Steele, 7 O'Callaghan St, Holland Park Qld 4121.



Rondo Kato: Katamantoj: nun vi havas propran oportunon interrilati kun aliaj katamantoj tutmonde pere de Rondo Kato. Por detaloj, kontaktu la Nov-Zelandan reprezentanton Marilyn Henderson, 6 Beetham Street, Masterton 5901, Nov-Zelando.



NIA FOTOALBUMO



Jozefo Major



Geedziĝo de Lian Pei Wing kaj Stephen James Pitney
Melburno, 2 oktobro 1993



EL LA REGIONOJ

Nov-Zelando: *Esperanto-Rondo de Wellington*, novembra kunveno: La prezidanto, Bill Aldridge, bonvenigis D-ron Aleksandro Dymnikov kaj lian edzinon. D-ro Dymnikov nuntempe havas postenon rilate fizikon en la Universitato de Melburno, sed anticipas reiri al Sankta-Petersburg, Rusio, post jaro en la antipodo. Li distris la rondanojn per allogaj diapozitivoj montrantaj belajn konstruaĵojn, preĝejojn kaj pejzaĝojn tra Rusio, Ukraino, Uzbekistano, ktp, ĝis Vla-

divostok, Siberio, ĉe la bordo de la Japana Maro. Afable li respondis al demandoj de la ĉeestantoj kaj ridete klarigis ke veturado en Rusio ne estas ĝenerale luksa por rusiano, kiu post uzo de trajno devas eble piedmarŝi kaj eĉ uzi azenon por porti la pakaĵojn se li deziras rigardi la kamparon. Tamen, se oni povas juĝi per la bildoj, la penado estas tre rekompensa. Ni treege dankas vin, geamikoj.—Raportis Mary Richardson.]



PRI ILTIS-ELDONEJO DE ULRICH BECKER

(*Represita el Esperanto* aktuell 6/93)

[Pli da detaloj por kompletigi la piednoton sur p.13, *ESK* 3/1993]

Plurloke en Germanio estas eldonataj gazetoj, revuoj, libroj en Esperanto. Pri tio okupiĝas ne nur asocioj kiel GEA aŭ GEJ aŭ fakaj asocioj, sed ankaŭ privataj entreprenoj, ĉu en Gerlingen-Stuttgart, en Paderborn, aŭ—en Saarbrücken [neglektante] por momento batalojn de skoliĝemuloj).

Laŭ *Iltis-Forumo* (1/1992; internacia kultura-literatura revuo en Esperanto) ĝi ekis en 1989, iom post la konatiĝo de Reinhard Hauptenthal (redaktoro de la revuo kaj, supozeble, motoro de la eldona ag-

ado) kun Ortwin Teubert, profesia eldonisto. La lasta kajero de *Iltis-Forumo*, kiu atingis nian redakcion, estis la numero 2/1992. La ĉefa kvalito de la revuo estis ĝia seriozeco, ĉu en la scienceco de ĝiaj literaturaj aŭ kulturaj eseoj, ĉu en la prezentomaniero de ĝiaj originalaj aŭ tradukitaj poemoj kaj prozaĵetoj. en la severaj starpunktoj de recenzantoj kaj en lingvaj debatoj.

La eldonejo ofertas ankaŭ multajn librojn—beletrajn kaj fakajn. Detalojn ĉe: *Iltis-eldonejo*, Postfach 1530, 66386 St. Ingbert, Germanio.

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

estas komuna eldonaĵo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Membrokotizoj: AUD\$30 por individuo, klubo, kc; \$35 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso); \$20 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ĉiujn nomo- aŭ adreso-ŝanĝojn nepre sendu al la redakcio.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Brian Fox, 634 South Titirangi Rd., Auckland 1007. ☎ (09) 817 8244.

Sekretario: Jo Knight, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003. ☎ (09)-846 2601

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003.

Membrokotizoj: NZ\$30 por individuo; \$40 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo po \$1 por ĉiu ano, maksimume \$15.

Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas 50 ned. gld., kio inkludas aĉerpoŝtan sendadon. Oni povas mendi la gazeton pere de UEA.

>>>><<<<

Bonvolu avizi la redaktoron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio, se via adreso estas neĝuste presita sur la adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. (☎ Aŭstralio 09 574 1307; fakso 09 574 1530.)

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1994 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tju numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1994 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita kaj ekzemplero de tiu eldonaĵo en kiu la materialo aperas estas sendita al la redaktoro. Represo de la rakonto de Kurt Vonnegut Jr estas malpermesita sen eksplicita permeso de la posedanto de la kopirajto. Represo de la verkoj de Odlo Bokserp estas malpermesita de la Internacia Asocio de Preskuboldoj laŭ leĝe registrita kontrakto kun Odlo Bokserp (per detaloj, kontaktu la Asteroidon Zamenhof, fakso 3987-634567-9783-0/54).

Wholly printed in Australia. Computer composed and typeset in International Font New Century Schoolbook, Futura Book, and International Font Helvetica, using Microsoft Word 8.1 on a Macintosh Classic II running System 7.1, by Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.